



8-6-1974

CGC N°
00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL

Sede: Edifício Jockey Clube, sala 103
Setor Comercial Sul

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73

Telefone 4-8033

11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA

Caixa Postal 07 – 1182

Telefone 226-1298

70.000 – Brasília (DF)

MAIO DE 1980

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

BOLETIM N° 54

Redação: MARIA ALMADA



Sur la foto estas grupo da kongresanoj, en Juiz de Fora (MG) antaŭ la inaŭguro de la busto de L.L. ZAMENHOF, kadre de la 1-a kongreso de BKE, en la parko "JARDIM GLORIA".

La buston ĝentile ofertis la Kultura Kooperativo de Esperantistoj, kaj la foton faris kaj ofertis, ŝano João Masiero, el São Paulo.

La 1-a Kongreso de la Brazila Konsi-

lantaro de Esperanto, okazis de la 3-a ĝis la 6-a de aprilo de 1980-a, en Juiz de Fora. Partoprenis ĝin ĉirkaŭ 130 personoj el diversaj ŝtatoj. Ĝi utilis: por, propagandi pri la internacia lingvo, Esperanto, en tiu universitata urbo oficiale lanĉi la enskribigon por la okazonta 66-a UK en Brazilo, venontjare, kaj reorganizi la statuton de BKE.



BRAZILA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

Caixa Postal Nº 11-1110
70.000 — BRASÍLIA — — DF
BRAZIL

RELATÓRIO — JULHO/DEZEMBRO 1979

CAIXA

MÊS	DISCRIMINAÇÃO	ENTRADA	SAÍDA
JUL	Adesões	4.450,00	
	Impressão Impulso		2.500,00
	Correio (264693 CR)		23,50
AGO	Adesões	900,00	
	Impressão fls. adesões		300,00
	Abertura Cx. P. 954/GO		125,00
	Fotocópia		33,00
	Cartório		300,00
	Correio		760,50
SET	Adesões	1.200,00	
	Correio		1.150,00
OUT	Adesões	300,00	
	Correio		34,00
NOV	Adesões	200,00	
DEZ	—	—	—
TOTAL		7.050,00	5.226,00

Saldo em 31/12/1979 Cr\$ 1.824,00

Neima Cardoso Adôrno — 1ª Tesoureira

Dum la I-a Kongreso de Brazila Konsilantaro de Esperanto estis decidite, ke la direktoraro de tiu organizaĵo aktive kunlaboru kun la gejunuloj de Brazilo. Laŭ la nova statuto de BEJO - Artº 5-a, ekzistas membroj de tri kategorioj:

I-a — Membroj ĝis 30 jaroj;

II-a — Protektantoj, personoj pli ol 30-jaraĝaj;

III-a — Patronoj, kiuj helpas mone la organizaĵon. Ĉiu helpo estas bonvena, do, ni helpu la junularon!

66-A UNIVERSALA KONGRESO

En Brazilja, la L.K.K. kontentige aktivas. Post la I-a Kongreso de BKE granda nombro da gesamideanoj aliĝis al la venontjara UK.

Plezure ni konstatas, ke la esperantistaro serioze sin preparas por la evento. Prave. La 66-a UK estas de ĉiuj brazilaj esperantistoj, sekve ni ĉiuj sammaniere respondecas por ĝia sukceso.

La organizantoj de la UK estas multaj kaj ni ĉiuj bonvole devas ilin helpi. Kiu nuntempe aliĝas al la UK helpas al la L.K.K. kaj gajnas rabaton. Do estas petate al niaj gesamideanoj, ke ili aliĝu tuj kaj faru propagandon en siaj medioj pri la granda evento en nia kara lando.

Volu ne forgesi ke "Unuigo faras forton".

La aktualaj LKK-anoj estas:

Prezidanto: Senatano D-ro José Lins Albuquerque. Vicprezidanto: D-ro Enivaldo Alves Silva. Sekretario: Prof-ro Nelson

Pereira de Souza. Protokolo: F-ino Néia Lucia Souza. Financa Respondeculo: Carlos A. Siqueira da Cunha.

Komisiitoj:

Pri loĝado: Francisco Mattos de Oliveira. Pri Arto: Maria Nise Stuart Lins Albuquerque. Pri Ekskursoj: Josias Ferreira Barbosa. Pri Junularo: Neima Cardoso Adôrno. Pri Landa Informado: Darcy Pedroso Machado Gaia. Pri Eksterlanda Informando: Roberto Passos Nogueira. Pri Infana Kongreso: Maria do Socorro Sampaio Nogueira. Pri Ĝiĉetoj: Mauro Gomes Azevedo. Pri Universitato UK: Prof-ro Paulo Vieira da Silva.

KONGRESKOTIZOJ POR LA 66-A UK DE BRAZILLO ĜIS LA 9-A/VIII/1980:

Kategorio 1 - Kongresano ne membro individua de UEA.	125
2 - Kongresano individua membro de UEA kun jarlibro.	103
3 - Same kun jarlibro kaj revuo.	70
4 - Edz (in) o de kongresano en kategorio 1.	88
5 - Edz (in) o de kategorio 2 aŭ 3.	72
6 - Junulo ĝis inkluzive 20-jara.	38
7 - Plentempa studento ĝis inkluzive 30-jara.	63
8 - Blindulo.	50

Ĝimarko: Latinamerikanoj povas pagi la kotizon en sia nacia mono, laŭ kurzo en la dato de la monsendo, rekte al la LKK-Kasisto: CARLOS AUGUSTO SIQUEIRA DA CUNHA, Caixa Postal 13-2088, CEP 70.000 - Brasília (DF) - Brazilo.

NOVAJ DONACOJ POR LA SIDEJA KAMPANJO

Danke ni ricevis la jenajn:	
Manoel Borges dos Santos (Kotizo).....	1.000,00
Eurico Antonio Ribeiro (Kotizo).....	500,00
Luiz Teixeira Martins (Kotizo).....	2.000,00

Sirio Silva (Kotizo).....	1.000,00
Balbina Ferreira (Kotizo).....	2.000,00
Sorokaba Esperanto-Klubo (Kotizo).....	1.000,00
Maria Julia J. R. da Cunha.....	10.000,00
Elmano R. A. Barbosa.....	10.000,00

SAME POR LA BULTENO

Claudio Zimmermann.	150,00
Antonio R. Cunha.	500,00
Jayme de Paula.	500,00
Modesto Belmonte de Abreu . . .	500,00
Sebastião Paiva.	500,00
José S. Mattos.	100,00

1-A TUT-AMERIKA ESPERANTO KONGRESO

De la 12-a ĝis la 15-a de Julio, 1980 okazos en S. LUIS - Argentino la 1-a Tut' Amerika kongreso de Esperanto. Adreso: Casilla Correo 289 - 2000 - Rosário - Argentino. Peranto en Brazilo: - Kultura Kooperativo de Esperantistoj - Av. 13 de Maio, 47, sobreloja 208 - Tel. 252-0829 - CEP 20.000 - Rio de Janeiro (RJ). Kotizoj ĝis 31-a de Maio US\$ 40,00 post tiu ĉi dato US\$ 50,00. Pliajn informojn oni sin direktu al D-ro Braz Cosenza - laŭ la supraj adresoj.

La vojaĝo al Argentino estos amuza, ĉar multaj brazilaj urboj estos vizitataj, kaj en Argentino mem oni havas specialan ekskurson, kiu ebligos la partoprenantojn koni grandan kaj belan parton de la lando. En Argentino estas rezervitaj 50 lokoj por la junularo brazila. Al Argentino, do, en Julio!

SAN PAULO (SP)

San Paulo Esperanto-Asocio okazigos Ordinaran Asembleon en la 24-a, je la 18-a horo por pritrakti: a) Legadon de la antaŭa asembleo; b) Diskutadon pri la projekto de nova statuto; c) Konfirmon pri la monata kotizo por 1980; kaj d) Generalajn temojn. La anoj estas invitataj.



LINGVA PRIKOMENTO

D.W. (Argentino)

(Daúrigo)

(Tamburo, cimbalo) batante produkti sonon. Oni distingu, ekzistas: blovinstrumentoj (muzikilo, en kiu sonoro estas produktata per blovado). - Kordinstrumento (per vibrado de kordoj) k.t.p. "Li aĉetis antaŭpreparitan domon, tre malkare". Em ĉi tiu frazo la vorto "antaŭpreparita" ne taŭgas. Oni diru: "pretkonstruitan domon". Analoge: "pretkudrita vesto". Oni surnetas aŭ demetas veston. "Mi ne volis aĉeti la fromaĝon sub la kloŝo ĉar ĝi estis jam putrita, interne kun verdetaj formajoj". Ŝajnas, ke la verkinto eraris pri la fromaĝo ĉar eble temis pri "ŝimfromaĝo". Kiu estas speciala fromaĝo, interne simila al geogradia karto. "La plej bona pafisto ricevis premion" - ni diru: "la pafertulo" ricevis premion "Ŝi sidis en brakseĝo kaj diskomponis ŝtrumpojn. En ĉiu tiu frazo ne taŭgas la vorto "diskomponis", devas esti: "sidis en brakseĝo kaj dismaŝigis ŝtrumpojn". Atentu la "maskiraslo!" Mezepoka armajo farita el feraj interplektitaj rigetoj". "La domo estis tre simpla, kovrita per rulita lado. "La vorto "rulita" en tiu ĉi frazo estas tre malbona kaj neklara. Ni diru: "La domo estis tre simpla, kovrita per ondumita lado". Ondumi la ladon - doni al la lado ondoformon. "Disonda" sulko, kiun la ŝipo lasas malantaŭ si". "Eĉ ne unu liberan lo-

kon ni vidas". La vorteto "ne" estas en malĝusta loko. La korekta vortordo estas: "Eĉ unu liberan lokon ni ne vidas". "Mi hejmenvenis el Francujo trans Nederlando" - La vorto trans estas malĝusta. D. 1. tra "kiu signifas eniri Nederlando ĉe unu flanko kaj eliri el ĝi ĉe alia flanko. "Mi spertis en unu jaro pli ol miaj gepatroj spertis dum ilia tuta vivo". "Mi estus feliĉa, kiam vi povus veni al mi". En tiu ĉi frazo la vorto "kiam" estas malĝusta ĉar oni parolas ne pri tempo sed pri kondiĉo.

Tial oni devas uzi la vorton "se". (Daurigota).

65-A U. KONGRESO DE ESPERANTO - Stokholmo - 2:8 - 9:9/1980

Estas tradicio, dum la Esperanto-Kongresoj, ke la delegacio de invitanta lando estu aparte multenonbra dum la kongreso de la antaŭa jaro. En nia kazo, Stokholmo atendas la alvenon de multaj brazilanoj, kapablaj "varmigi" la nordajn temperamentojn kaj instigi al amasa ĉeesto en Brazilja!

Pasintjare, el Brazilja flugis al Lucerno grupeto da esperantistoj je favoraj parto-pagaj kondiĉoj. Ĉi-jare, oni intencas kunigi pli grandan grupon por ke la kondiĉoj estu eĉ pli favoraj.

Se vi revas esti heroldo de nia 66-a UK en Stokholmo, ne rezignu pro financaj konsideroj, sed komencu prepari la valizojn kreu pozitivajn pensojn jam aligante la kongreson. Kiam spirite vi jam estos la kongresanoj, la nura problemo estos la transporto, ĉar la aliaj elspezoj estos modestaj konsiderante, ke, dum la kongreso oni povos ankaŭ fasti kaj tranokti en malmultekosta amasloĝejo. Pri la flugo, mi volonte informos vin, se vi skribos al mi, kaj vi miros, kiel "mildaj" estos la nomataj parto-pagoj, precipe en la kazo de almenaŭ 15 vojaĝantoj! Sed kio gravas, estas voli flugi al Stokholmo: la ceterajn detaletojn oni facile solvos. Giuseppe Grattapaglia - Ĉefdelegito - Caixa Postal N^o 04-0097 - CEP 70.000 - Brasília (DF).

SENVORTA ESPERANTO DE AŬTISTOJ

G. Otto Vaske-Rua Esperanto s/nº - 95760 - Caí (RS) - Brazilo.

Normigendas nesribita kodo, vaste uzata inter tuj preterveturantaj aŭtomobilistoj, ankoraŭ ne de ĉiuj bone komprenata.

01 - DANGERO: kutima aversigno, per korta ŝalto de lanternejoj, por atentigi pri sia fermita mano kun polekso turnita malsupren. Nokte, turnavertiloj (sagoj) maldekstren ŝaltitaj. Aŭtobusoj faras serion da ŝaltmaŝatoj de sia lumigita celosurkribajo.

02 - ĈIO BONORDE: fermita mano kun polekso suprenstaranta. Nokte, ambaŭ flankaj turnavertiloj ŝaltitaj.

03 - AKCIDENTO antaŭ vi: kutima perlanternega aversigno por montri sian malfermitan manon frapantan sur la stirradon. Ankaŭ noktaj danĝerosignoj.

04 - BESTOJ surŝosee: kutime perluma aversigno, mano kun fingroj teren, movoj imite al piedmovo. Nokte, danĝerosigno.

05 - PLUVO renkontanta: mano kun fingroj malsupren, imite al duŝo.

06 - GLITA ŝoseo: eksterfenestra brako, polmo teren, zigzaganta. Nokte, danĝerosignoj.

07 - DANGERA preterpaso: antaŭiranta veturilo ŝaltas turnavertilojn maldekstren. Eksterfenestra brako, polmo malantaŭen.

08 - INSPEKTU: perlumega aversigno, dekstramano sur maldekstra ŝultro. (Kontrolu radojn, oleoperdon, lampojn, fumofonton, defalontajn, ktp). Nokte, du duopaj sonilsignoj. (morsa . . .)

09 - SALUTO: korta lumsigno sekvata de iom pli longa. (morsa A . -). Mansvingoj.

10 - PRETERPASPETO: serio da 3 lumegoŝaltoj kaj/aŭ 3 etaj sonilsignoj.

11 - PRETERPASIVITO: eksterfenestra brako, malfermita mano, polmo antaŭen, ripetataj movoj antaŭen.

12 - DANKON: du kortegaj sonilsignoj. Salutaj mansvingoj.

13 - BV MALALTIGI viajn lanternejojn:

unu tre korta ŝalto de siaj altaj lumegoj. - Kontraŭ ĝeniga alta lumego (sur retrospeguloj), de proksima postvenanto: serio da alternaj ŝaltoj dekstren-maldekstren de siaj turnavertiloj.

14 - MALRAPIDU: eksterfenestra brako, polmo tereturnita, movoj supren-malsupren. Du piedpremetoj sur la bremsantaŭ ekbremsi (morsa U . . -)

15 - HALTU: lumega aversigno, 3 etaj sonsignoj, levita malfermita mano (ĉe tre bezona informigo, sekurecinformoj, ktp).

16 - ATENCO - SOS: bonvenatas sugestoj. Provizore, "mallerta" motormortigo. Ofta, nerva serio da premetoj sur la bremsopor ŝaltetadi ties avertlampojn. Mano sur vango (dento doloras).

Aŭtistoj bonvolu kompletigi kaj ensendi al ĉi-periodaĵo plibonigojn al ĉikodo kiu ie ajn tuj amikigas nekonatulojn kaj ĉarmigas longajn vojaĝojn. E-organoj publikigos la normigitan internacian kodon, ĉiu el ni disvastigos ĝin menciante la fonton, memkompreneble.

INFORMOJ DE NORDO ĜIS SUDO

Fortaleza (CE) - Prof-ro Paulo Amorim Cardoso informas nin, ke la de li gvidata koresponda kurso daŭre funkcias. Li sendas la necesan lerno-materialon al la interesatoj kaj la tuta kurso kostas Cr\$ 350,00.

Interesaj libroj estas aĉeteblaj ĉe li, kiel: Baha 'U' Iláh kaj Nova Epoko, Cr\$ 150,00; Esperanto Lingvo Viva Cr\$ 120,00; "Destruindo a Torre de Babel, Cr\$ 35,00 kaj aliaj.

La junularo el Ceará deziras progresi kaj bezonas monhelpon. Ili vendas belajn emblemojn el plastika materialo kun eldiraĵoj: "Esperanto Lingvo Internacia", ĉiu ekzemplero kostas Cr\$ 20,00. Helpu la junularon! La adreso: - **Paulo Amorim Cardoso, Caixa Postal nº 1221 - CEP 60.000 - Fortaleza (CE).**

Natal (RN): En ĉiu tiu jaro festas sian 40-an datrevenon la Potigvara Esperanto-Asocio de Natal. Ni gratulas kaj deziras progreson.

Laŭ la Bulteno de la societo, ĝi havas fincan malfacilaĵon. Nome la prezo-luo de la sidejo estas Cr\$ 3.000,00 monate. Pro tio ili lotumas gravurilon la 29-an de junio; ĉiu ekzemplero kostas Cr\$ 50,00. Kiu volas kunlabori, la adreso estas: Potigvara Esperanto-Asocio-Av. Rio Branco, 533 - S/10 - 1^o andar - CEP 50.000 - Natal (RN). Nova direktoraro de la Asocio: Prez.: Marcos Campo da Silva; vicprez.: Carlos José Cabral de Medeiros; Sekretario: Ivaldo Alves de Souza; Kasistino: Helenice Vital.

Kontrola Konsilio: - - - Jaci Cabral de Medeiros; Eduardo Jorge Maciel Pinheiro kaj Paulo Rodrigues Rosa.

Garanhuns (PE): Ni ricevis el Garanhuns afikson kaj "Guia Turístico de Garanhuns" pri hoteloj, vidindaĵoj de tiu interesa urbo el Pernambuco.

Ni gratulas niajn diligentajn gesamideanojn el Recife kaj Garanhuns, kiuj kune organizas II-an Nordorientan Regionan Esperanto-Renkontiĝon, dezirante sukceson.

II Encontro Nordeste de

ESPERANTO

A Língua Auxiliar

Internacional

4, 5, e 6 de julho / 80

Garanhuns - PE

Sob os auspícios da

**Associação Pernambucana de ES-
PERANTO e do Clube Esperantista
de Garanhuns**

Patrono: Prefeito Ivo Amaral

Salvador (BA): Samideano D-ro Sergio Luiz Silva Santos, vicprezidanto de BKE, informas nin, ke BEA - Bahia Esperanto-Asocio, troviĝas inter niaj plej aktivaj kunlaborantoj.

S-ano D-ro José Siqueira da Rocha gvidas esperantan kurson en la Institut Kardecista de Bahia, lernas la internacian lingvon ĉirkaŭ 30 ĝelernantoj.

Same, prof-ro Manoel Borges dos Santos instruas en la sidejo de BEA kaj en la preĝejo "Messiânica".

La 14-an de aprilo la anaro de BEA kunvenis ĉe la statuo de Zamenhof por memorigi la datrevenon de la forpaso de nia Majstro. Dum la kunveno parolis la prezidanto de BEA pri Zamenhof kaj Esperanto.

Estis elektita nova direktoraro de BEA:

Prez.: D-ro Isao Noguti

Vicprez.: D-ro José Siquara da Rocha

1-a Sekret.: D-ro Geraldo Bensabath

2-a Sekret.: Manoel Borges dos Santos

1-a Kasisto: José Adson de Almeida

2-a Kasisto: Leila Santos Pereira

Bibliotekisto: Cap. Godofredo de Araújo Góes.

Prezidanta Asesoro: Prof-ino Vivaldina Magalhães Caymi

Kontrola Konsilio: D-ro Jaddo Couto Maciel, Edson Guimarães Pedra, Onias Almeida.

Diskoniga Depart^o: D-ro José Berberi de Castro

Socia kaj arta Dept^o: Jackson Atila Galvão
Virina Dept^o: Prof-rino Marizeth Bensabath

Junulara Dept^o: Einaldo Leite de Brito

Lerneja Dept^o: Raimundo José Pitanga

Jura Asesoraro: D-ro Joel de Oliveira, D-ro Eduardo Carichio, D-ro Antonio Fernando da Cunha kaj D-ro Aristoteles Gomes Filho.

Brazilja (FD): Senditaj de nia Ĝenerala Sekretario, ni ricevis:

INTERNACIA JURA REVUO, ESPERANTO FERVOJISTO kaj MONDA TURISMO

Ni danke ricevis la numeron 20 (9/1979/2) de tiu grava faka periodaĵo kun la bonegaj artikoloj: 1) Jurpunaj Ideoj de Aristotelo; 2) Pri Sklaveco laŭ Antikvaj Leĝoj; 3) La Homaj Rajtoj en Aŭstrujo; 4) Internacia Amnestio; kaj krome Notoj, Recenzoj kaj Terminaro Jura-Diplomatia. Ĝi estas organo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IDEAJ), al kiu rajtas aliĝi ĉiuj diplomitoj en jura fakultato, kiel regula membro, kaj ĉiuj jurostudentoj aŭ laborantoj en juraj institucioj, kiel eksterordinaraj membroj. - Adreso: - Lendkaj 111/A - 8020 - Graz-Aŭstrio.

Ni ankaŭ ricevis la eldonaĵon "Esperanto Fervojisto" - I.F.E.F. - Sekcio - Ĉe s-ro Yves Guegueniat - rue des Romarins - Saint-Pierre-Bois/ F - 67220 - Villé-Franco.

Alvenis ankaŭ la "MONDA TURISMO", eldonaĵo de la Turisma Internacia Asocio, kun kalendaro por la jaro 1980, kiu montras al ni: "se iu havus tempon kaj monon, tiu povus la tutan jaron - de la 1-a de januaro ĝis la 31-a de decembro - partopreni esperantistajn eventojn ie en la mondo. Reprezentanto por Brazilo: S-ro Giuseppe Grattapaglia, C.P. 04-0097, CEP 70.000 - Brasília (DF).

Santos Dumont (MG):

Nia vicprezidanto Gilberto A. Silva Velho vokis la atenton de la prezidanto de BKE, F.S. Almada, ke la starigita busto de Zamenhof en tiu urbo estis forigita de ĝia loko. La prezidanto de BKE tuj skribis al urbestro de Santos Dumont pri-demandante pri la afero, responde la urbestro informis, ke oni elektos novan pli taŭgan lokon, ĉar la utiligita estas du kilometrojn for de la centro.

Eble la busto estos restarigita sur la strato "Esperanto" en la urba kvartalo "Sao Miguel". Ĝi estas nuntempe kun D-ro Palmieri.

VOLTA REDONDA (RJ)

Ni dankas la afablajn vortoj de nia estimata vicprezidanto D-ro Alberto Flores rilate nian laboron pri la organizado de la 1-a kongreso, okazinta en Juiz de Fora. Vere estis laciga nia laboro, sed la kontento de la partoprenintoj rekompencas nin. Ni laboras por nia movado sincere kaj sindediĉe.

La gazeto "Sul do Estado" publikis bonegajn artikolojn pri la BKE-kongreso kaj la Esperanto-movado, verkitaĵ de S-ano Flores.

En Volta Redonda oni povas lerni senpage Esperanton kaj la portugalan lingvon, danke al prof-roj Flores kaj Baylão.

Imitinda laboro:

Veku, ho veku, veku konstante,
ne timu ridon, insulton!

Voku, ho voku, ripetadante,
Ĝis vi atingos aŭskulton!

Zamenhof

CAÇAPAVA (SP)

S-ano Silva Velho, kiel ĉiam, organizis bonegan ekspozicion dum la 1-a kongreso de BKE, kaj tiel kunlaboris por ke la evento estis bonsukcesa kaj brila.

Li fotis la ĉeestantaron kaj ĝentile disponigis al ni kelkajn sukcesajn fotojn, kiujn ni gardos en speciala albumo pri la kongreso.

Li bonege propagandas la Esperanto-movadon, verkante artikolojn por multaj gazetoj, precipe pri la laste okazinta BKE-kongreso. Ni dankas.

Caçapava festis sian datrevenon je la 14-a de aprilo. S-ano Silva Velho verkis la kvarversajon tiurilate:

"Caçapava - urbe repleta
de alegria juvenil:
nasceste em data certa,
num quatorze de abril! . . .

SAN PAULO (SP)

La gazeto "Diário Popular" aperigis bonegan artikolon pri la 1-a kongreso de BKE, redaktitan de nia sam-ino Elvira Fontes. Bonega propagando.

En la sidejo de APE daŭre funkcias diversaj kursoj, librovendejo, kie estas

aĉeteblaj fremdaj libroj kaj naciaj. Interalie estas la bonega esperanta legaĵo Esperanto sen Antaŭjuĝoj de prof-ro Walter Francini, kaj la lernolibro de F. S. Almada, Esperanto Elementar, krom aliaj.

La korespondan kurson prizorgas sam-ino Elvira Fontes. La adreso: Caixa Postal n^o 5.888 CEP 01.000 - S. Paulo (SP) aŭ Av. S. João, 1333, cj. 21.

BAURU (SP)

S-ano Prof-ro Antonio João Fraga Padilha, el tiu progresema urbo, sendis al ni filatelaĵojn. Li informas nin, ke en Bauru okazis du filatelaj Esperanto-montroj, la unua en 1949 kaj la dua en la pasinta jaro de la 15-a ĝis la 21-a de decembro. Kiu interesiĝas pri filatelaĵoj volu sin turni al li, laŭ la adreso: Rua Floriano Peixoto, 10-37, CEP 17.100 - Bauru (SP). Li informas ankaŭ, ke ĵus estis inaŭgurita nova kurso pri Esperanto en "Liceu Noroeste de Bauru". Kies direktoro prof-ro José Augusto Vieira Ranieri, disponigas komfortan ĉambron por la instruado. Ĉiudimanche la gazeto "Jornal da Cidade" aperigas kolumnon sub la titolo "Que lingua falar?". La "Escola Progresso de Bauru" eldonigas flugfoliojn kaj krom la lingvoj germana, hispana kaj franca ĝi anoncas la instruadon de Esperanto. Ke la esperantistoj el Bauru estas diligentaj pruvigas la fakto, ke krom instrui Esperanton, propagandi pri la movado, starigi ekspoziciojn pri filatelaĵoj kaj regule kunvenadi, ili klopodas aĉeti propan sidejon. Ni deziras sukceson al ilia kampanjo.

S-ano Paiva, malnova batalanto por-esperanta estas pri lia sindediĉo al orfoj. Li estas direktoro de la "Sociedade Beneficente "Cristã", de Bauru. Oni prizorgas tie multajn orfojn, malsanulojn kaj kadukulojn senpage. Ni gratulas niajn karajn baŭruanojn.

SOROCABA (SP)

La 10-an de majo festis sian 15-an datrevenon la Programo Esperantista ĉe la Radio Sorokaba; la 13-an datrevenon de Sorokaba Esperanto-Klubo. La klubanoj invitis ĉiujn geesperantistojn parto-

preni ĝin. La prezidanto de BKE sendis telegramon gratulante pro la evento.

RIO GRANDE (RS)

La gazeto "Rio Grande" aperigas la centan artikolon pri Esperanto kaj ĝia movado, verkitan de s-ano Manoel Torres de Abreu. Tiu elstara ĵurnalo de Rio Grande konstante kunlaboras kun la esperantistaro kaj volonte aperigas artikolojn. Bonega ekzemplo! Ni kore gratulas ĝian redaktoron kaj ĝiajn kunlaborantojn, kaj dankas la ĝentilan helpon.

GAZETOJ RICEVITAJ

Ni ricevis kaj dankas la jenajn periodaĵojn:

Folha de Caçapava, Destaque el Rio Grande do Sul, A Nova Era, Diário de Jacaré, O.NO-SSO, Jornal do Imigrante, Gazeta da Bahia, Jornal do Turing, ZET, el Jugoslavio, Fervojista Bulteno, el Svislando, Rio Grande, Kvakera Esperantisto, Diário Popular Sul do Estado.

SELO USADO

O selo usado vale dinheiro. O selo comemorativo vale mais do que o comum. O (a) esperantista pode aproveitar a oportunidade e usar selos comemorativos. Eles constituem fonte de renda, e isso pode servir para as nossas instituições. A própria UEA pede que se usem selos filatêlicos (comemorativos): Revista Esperanto - julho/agosto, p.140, e novembro, p.119, ambas de 1979.

AL JUIZ DE FORA

De Dokito

Urbo inter montar' — Juiz de Fora,
vi tuj katenas nin per viaj ĉarmoj!...
Se hejmeniras ni al urbo fora,
pro vera respiro — ŝprucas larmoj...

Ne larmoj de amarec' aŭ mens' angora,
sed nur de dankemeco kaj korvarmoj!...
Pro via gastameco kunlabora,
Al Dio dankas ni per koraj psalmoj...

Denove ni kunvenos en Kongreso,
por konstati altiĝon de l' progreso
pli grandan ol grandeco de l' montaro!...

Ne nur kreskigo de la monda riĉo,
sed, ankaŭ, de l' prospero kaj feliĉo
de via laborema logantaro!...

Juiz de Fora, la 5-an de Aprilo, 1980.



CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

TESOURARIA

Caixa Postal 13-2088 - Fone: 243-5486

70.000 - Brasília (DF)

CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

CGC 00 406 504/0001 06 Brasília

BALANCETE DE VERIFICAÇÃO

Em 30-04-80

D É B I T O

CAIXA	7.164,06
BANCOS	14.853,38
CONTAS CORRENTES	
- Francisco de Souza Almada	9.901,20
BENS RECEBIDOS EM DOAÇÃO	860,00
IMÓVEIS	320.000,00
MÓVEIS E UTENSÍLIOS	27.700,00
DESPESAS C/BOLETIM INFORMATIVO	10.728,10
DESPESAS DA SEDE SOCIAL	5.570,02
DESPESAS COM CONGRESSOS PRÓPRIOS	12.950,00
DESPESAS DE DONATIVOS A ENTIDADES ESPERANTISTAS...	7.825,00
DESPESAS GERAIS	4.492,30
	<u>422.044,06</u>

C R É D I T O

CONTRIBUIÇÕES PECUNIÁRIAS, RECEBIDAS	11.390,00
DONATIVOS PRO-SEDE PRÓPRIA, RECEBIDOS	143.500,00
RECEITAS DE CONGRESSOS PRÓPRIOS	28.600,00
RENDAS DIVERSAS	503,04
TÍTULOS A PAGAR	-,-
CREDORES POR SUPRIMENTOS À CAIXA	
- Carlos A.S. Cunha - Tesoureiro	15.000,00
FUNDO SOCIAL (PATRIMÔNIO)	223.051,02
	<u>422.044,06</u>

Brasília (DF), 30 de abril de 1980

Carlos A.S. Cunha
Tesoureiro
CRC.SP 43.051
CRC.S.DF. 360

Caso/.



Sur la foto estas la direktoraro de BKE kaj la prezidanto de la Kultura Koperativo de Esperantistoj, d-ro Braz Cosenza, dum la Kongreso de la Brazila Konsilantaro de Esperanto en Juiz de Fora. (Carlos S. da Cunha, F.S. Almada, Nelson P. de Souza, d-ro Braz Cosenza Kaj sam-ino Elvira Fontes en laborkomisiono)

(Foto de S-ano Masiero)



Unu el la debatitaj temoj de la Kongreso de BKE estis la SEKSA EGALECO. La temon ĉiuj trovis interesa kaj pluraj gesamideanoj partoprenis la debatojn. Sur la foto, Maria Almada, prelegas, pri la temo.

(Foto de S-ano Masiero)